

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

1 FEBRUARO 1978
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Ja till Stockholm

Nu är det bestämt! 1980 års världskongress för esperantister kommer att förläggas till Stockholm. Det har UEAs styrelse bestämt definitivt vid sitt sammanträde i januari.

Redan för mer än ett år sedan har Stockholms Esperantoförening lämnat inbjudan till UEAs styrelse om att förlägga kongressen 1980 till Stockholm. Strax därefter reserverade man redan kongresslokaler, för att vara säker att ha dem ifall inbjudan skulle antas. Invigningen kommer att ske i Konserthuset, medan Folkets Hus lokaler kommer att användas för de flesta andra arrangemangen. Man kommer att ta i anspråk även vissa utrymmen i Norra Latin, som ligger alldeles intill Folkets Hus.

Kongressen blir, med denna lösning av lokalfrågan, koncentrerad till absoluta centrum av Stockholm, nära till Hötorget, till centralstationen, till många hotell och matställen, från billiga barer till rena lyxrestauranger. Både cafeteria och restaurang kommer att finnas «i huset», om man vill stanna där.

Det andra alternativet hade varit Mässans lokaler i Älvsjö, men det föll bort på grund av avståndet till centrala stan och på grund av priset.

Kongresskommittén, vald redan i höstas, är nu permanentad och har redan haft flera sammanträden. Det som den betraktar som den svåraste uppgiften är att ordna billig logi i Stockholm. I det kan den inte få hjälp av några turistorganisationer, utan är hänvisad till sin egen uppfinningsförmåga. Det råder nämligen stor brist på billigare logialternativ i Stockholm, medan det finns gott om dyra.

Till de uppgifter som kongresskommittén har att lösa under de närmaste månaderna hör olika ansökningar av bidrag till kongressen. Redan den första budgeten, som presenterats till UEAs styrelse, pekar på utgifter i flera hundra tusen kronors klassen. Men så är också en esperanto kongress inte en liten sak: 1 500 deltagare är vad man väntar sig — och det är inte många internationella kongresser i Stockholm som som är så stora.

Att organisera en internationell kongress i Sverige igen (efter 1934 och 1948) känns som en stor utmaning för den svenska esperanto-rörelsen. Men vi kommer att klara det lika bra som de två tidigare!

— RIKSDAGSMÖTE —

Det finns riksdagsmän med intresse för esperanto

I mitten av januari ägde ett litet möte rum inom riksdagshuset. Åtta riksdagsmän och fem representanter från SEF träffades för att diskutera lite om esperanto. De fem från SEF var Ulla Luin, Lena Blomberg, Ragnar Hjorth, Roland Lindblom och Franko Luin. Av riksdagsmännen var fem kvinnor och tre män; samtliga partier var representerade, med undantag av (vpk).

Man har diskuterat ett sådant möte i flera år, men det har visats att det var svårt att hitta en tid, som skulle passa bra. Även till detta möte har flera, i och för sig intresserade, måst lämna återbud.

Mötets syfte var att lämna lite information till riksdagsmännen om vad som händer beträffande esperanto runt om i världen, inte minst inom olika

parlament.

Den efterföljande diskussionen kom att kretsa kring vilka möjligheter vi hade att få stöd i olika frågor. Diskussionerna ledde inte till något konkret: SEF-representanterna fick reda på vissa möjligheter som stod dem öppna, vissa förändringar i beslutsordningen när det gäller utbildningen (besluten kommer alltmer att hamna på regional nivå) och liknande.

Men en sak var klar: riksdagsmännen önskade sig att vi kom oftare till riksdagen och lämnade information, åtminstone en eller två gånger per år. Att bara åtta kom betraktade de inte som en dålig siffra; tvärtom de tyckte att vi lyckades ungefär lika väl som andra organisationer som kommer till riksdagen och lämnar upplysningar.

Franko Luin

**KONGRESSRESA
TILL BULGARIEN
STRAX KLAR!
BEGÄR BESKED
FRÅN SEF**

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffroy Sutton

Prenumeration 1978: 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Sats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1978

Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägerv. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Mölllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Ströme

Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

JES & NE

Anmäl dig till Uppsalakongressen!

Du har säkert märkt, att ett inbetalningskort är bifogat detta nummer av *La Espero*. Använd det för att anmäla dig till SEFs årskongress i Uppsala.

Du har säkert redan antecknat i din almanacka tiden för årskongressen: 22 och 23 april, ett vanligt veckoslut alltså. Det är tidigare än vanligt, därför måste också olika handlingar som behövs för kongressen vara färdiga tidigare. Det gäller t ex motioner, som styrelsen vill ha redan den 28 februari (senast!)

Priserna för årsmötet i Uppsala står på blanketten, så vi behöver inte upprepa dem här.

På annan sida i tidningen finns en artikel om Uppsala. I nästa nummer kommer lite mera om själva programmet.

En «väggtidning» för höstens kampanj

En «väggtidning» som sätts upp på flera platser i landet samtidigt — kan du eller din klubb vara med på det?

Esperantoförbundet planerar att göra en utställning till hösten i form av stora affischer.

Utställningen är tänkt att i korthet redogöra för var esperanto står idag, i form av en «väggtidning», med korta «artiklar» och med bilder. Affischarna blir 1 meter höga och 70 cm breda, tryckta i grönt och svart. Det blir troligen 8 — 10 affischer.



Förhoppningen är förstås att alla klubbar vill vara med på det, så att vi får igång en liten «kampanj» i höst. Därför är det viktigt att redan nu diskutera den här utställningen och beställa plats på bibliotek (eller ett annat liknande ställe) för tiden slutet av augusti — början av september.

Din klubb har fått information om utställningen. Ta därför upp frågan med din styrelse.

Traduka konkurso

La estraro de Sveda Esperanto-Federacio decidis organizi tradukan konkurson por stimuli al tradukado el la sveda lingvo en esperanton.

La traduka konkurso okazas en tri branĉoj:

1. poezio
2. beletra prozo
3. faka prozo.

La konkursantoj rajtas partopreni per libera nombro de konkursoj. La longeco de la unuopaj konkursoj estu maksimume: 100 versoj por poezio, 10 tajpitaj paĝoj por prozo (ne pli ol 40 linioj po paĝo kaj 60 literoj po linio, proksimume).

La konkursoj devas esti tajpitaj (sufiĉas unu ekzemplero) kaj akompanataj de kopio de la originala teksto, kun klara indiko pri aŭtoro, libro, eldonejo kaj eldonjaro.

Por 1978 partoprenas ĉiuj, kies konkursoj atingos la ĵurion antaŭ la 31a de marto 1978.

La premiojn decidis la estraro de Sveda Esperanto-Federacio kunlabore kun Eldona Societo Esperanto.

La premioj estos disdonataj ĉe la jarkunveno de SEF en Uppsala.

Konkursoj, taŭgaj laŭ kvalito kaj longeco, aperos en *La Espero*.

La konkursantoj partoprenas malkaŝe, sen pseŭdonimo.

La ĵurio estas la redakcia komitato de *La Espero*.

La konkursojn oni sendu al Traduka konkurso, *La Espero*, 122 04 Stockholm-Enskede.

Examensdax! Anmäl dig nu!

I år har du möjlighet att ta examen i esperanto den 23 april. Det har Esperanto-Institutet bestämt.

Anmälan till lägre examen ska göras till Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 42174 Västra Frölunda, senast 8 april.

Anmälan till högre examen vill Ebbe Vilborg ha (adress: Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg), även det senast 8 april.

Språk, det är svårt det!

«Där stod USA:s president Jimmy Carter vid ankomsten till Warszawa och trodde att han levererade de gängse artigheterna till sina polska värdar. Men det gjorde han inte alls. Vad de fanbärande polackerna med kommunistpartiets ledare Edward Gierek i spetsen fick höra var i själva verket en rad förolämpningar. Det visste inte president Carter om då. Helt statsmannalikt höll han sitt ankomsttal och förlitade sig på tolken, men det skulle han inte ha gjort. Den något klantiga översättningen fick snabbt diplomatiska konsekvenser och tolken, den amerikanske UD-tjänstemannen Stephen Seymour, har som det heter nu 'befriats' från sitt uppdrag, rapporterar AP.

Seymour använde såväl ryska som polska ord då han översatte presidentens tal, visade det sig. Det fick oanade konsekvenser. Först fnissade polackerna, men sedan förmörkades deras anleten alltmer.

I sitt tal sade Carter på engelska "jag har kommit hit för att ta reda på polackernas önskemål inför framtiden". I den amerikanske tolkens översättning blev det på polska: "Jag känner köttslig åtrå till polackerna", uppger UPI.

Carters beskrivning av sin avfärd från Washington blev hos översättaren till: "När jag lämnade Förenta staterna för att aldrig återvända".

Inte en siffra rätt — så skulle man också kunna korrekturläsa tolkens bedrifter. Carter sade "Polen är mer än sex miljoner amerikaners hemland". Det blev i översättning: "En stat som utgör mer än tio miljoner amerikaners hemland".»

Detta och lite till kunde man läsa i DN på årets sista dag. Behövs det egentligen nån kommentar till det? Vi tycker att notisen talar för sig själv.

Klubo Cent får medlemmar

Klubo Cent, den nya «klubben» med understödande medlemmar, har fått sina första dito. Fram till den 15 februari, när denna lilla rapport skrivs, har följande löst sitt «medlemskap»: Ragnar Hjorth, Stockholm, Jan Strönne, Malmö, Anna-Greta Strönne, Malmö, Henry Almar, Uddevalla, Sven Sundin, Växjö, Henrik Karlsson, Kisa och Axel Eriksson, Ramvik. Esperantoförbundet tackar alla givare. Som du kunnat läsa i förra numret av *La Espero*, dras Esperantoförbundet ofta med underskott. Det blir ännu större, om vi sätter i gång nya verksamheter — och det måste vi helt enkelt göra för att få mera fart på hela esperantoverksamheten i Sverige.

Hur blir du medlem i **Klubo Cent**?

Det är enkelt: du sätter 100 kronor på postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet, och anger att det gäller **Klubo Cent 1978** på talongen.

Vi vill inte att denna klubb ska vara ett exklusivt sällskap: alla är välkomna till det!

Lyckat program i Radio Västmanland



Victor, Kaj och Ossian under sändningen

Radio Västmanland har haft ett program om esperanto den 2 januari. Deltagarna från Våsteråsklubben var nöjda med programmet och säger, att även programledaren var det. Hela programmet finns inspelat på band, ifall du vill lyssna på det. Det kan kanske användas för att övertyga andra lokalradio-stationer om att göra något liknande. Du kan beställa bandet (mot bandkostnad) hos Kaj Stridell, Rotevägen 1, 735 00 Surahammar.

Minani hälsar till sina vänner

Justin Minani har nu avslutat sina studier i Sverige och återvänt till Frankrike, där han tänker stanna i ca två år till, bli klar med sin doktorsavhandling om «Den svenska grundskolans problematik». Han tänker därefter återvända till Afrika, förmodligen Tanzania.

Minani har före sin avresa skickat oss ett tackbrev, riktat till alla som hjälpt honom i Sverige, både med uppgifter som han behövde för sin avhandling, men även ekonomiskt.

EVA enketas internaciajn parojn

La grupo EVA, Esperanta Virina Asocio, laboras ĉefe por ĝeneralaj problemoj de virinoj en Japanio.

De tie ankaŭ venas enketilo, kiu starigas demandojn pri problemoj en internaciaj geedziĝoj, speciale lingvoproblemoj. Kiuj lingvoj estas uzataj en familioj de internacia geedziĝo? Ĉu esperanto povas esti ĉiutaga lingvo same kiel aliaj naciaj lingvoj?

La ricevitaĵn respondojn ili publikigos en formo de broŝuro esperanta-japana. La kontribu-

intoj ricevos ekzempleron de ĝi, kiam ĝi estos preta, espereble en la venonta somero.

Kiom da paroj de internacia geedziĝo ekzistas en esperantujo? Tion EVA volas scii.

Ĉar la poŝto inter Japanio kaj Svedio estas malrapida, kelkaj el la virinoj, kiuj deĵoras en la oficejo de SEF volonte sendos kopion de la enketilo al internaciaj paroj en Svedio.

Kontaktu Svedan Esperanto-Federacion, adreso: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede. Tempolimo por la enketo estas januaro 1978, sed certe eblas respondi ankaŭ dum februaro.

HODIAŬ

De defensivo al ofensivo

Dum la lasta monato mi ofte pensis pri du vortoj, kiujn mi, pacifisto, ne ŝatas, ĉar ili apartenas al la militista jargono. La du vortoj estas ofensivo kaj defensivo. Vi certe mem konas ilin kaj scias, kion ili signifas. Mi povus ankaŭ pensi pri alia vortoparo, ekzemple atako-defendo, ankaŭ ili el la militista jargono, sed ĝuste la unuaj du fiksiĝis en la cerbo.

Ofensivon kaj defensivon mi kompreneble rilatigas al la esperantomovado, ne al ia milito. Tio, kio igis min pensi pri ili, estas intervjuo kun irana esperantisto, dro Saheb-Zamani, kiu aperis en revuo esperanto en la numeroj de decembro kaj januaro. Vi povas legi pli pri tiu intervjuo (svedlingve) sur la lasta paĝo de tiu ĉi gazeto. Ne sen kaŭzo mi pritraktas tiun intervjuon kiel unu el la plej gravaj 'dokumentoj', kiujn revuo esperanto aperigas dum la lastaj dek jaroj.

La intervjuo estas preskaŭ katalogo pri kiel la esperanto-movado devus agi: sisteme, celkonscie, persiste. Mi ŝatus diri: ofensive. Ĉar nia nuna agado — kaj mi celas ne nur Svedion, sed plejparton de la esperantomondo — estas ĉio krom ofensiva. Ni estas kontentaj, kiam ni ne rekte malprogresa, ni ŝajngas al ni mem, ke la «guto konstante frapanta» estas ŝtonskua torento, kiam ĝi en la vero nur estas sendanĝera roso. Ni estas en defensivo, sur preskaŭ ĉiuj kampoj. Ne sur ĉiuj, bonŝance.

Mi sonas eble iom pesimisma, sed tio ne estas mia celo. Mi vidas grandajn eblecojn por la esperantomovado. Sed por realigi ilin ni devos ŝanĝi nian defensivan sintenon, nian timemon tuŝi la kernon de la demando pri lingva egaleco, kiun ni celas atingi per esperanto.

Dro Saheb-Zamani diras en sia intervjuo, ke esperanto por ni eŭropanoj estas luksaĵo. Ĝi ne estas! Ni troviĝas certe en tute alia situacio ol la homoj en la tria mondo, ni havas multe pli da eblecoj sekvi la kulturen kaj sciencan evoluon de la socio, sed ni — kaj tio certe validas por Svedio, se ne por la aliaj eŭropaj landoj — estas jam tiel dependaj de unu kulturo kaj unu lingvo, la angla-usona, ke en kelkaj rilatoj ni similas al la dependeco de la landoj de la tria mondo.

Por dro Saheb-Zamani esperanto estas demando pri kultura vivo aŭ morto. Por Svedio oni eble ne povas uzi tiel drastajn esprimojn, sed ĝi certe estas demando pri kultura identeco kaj memstareco.

Tial ni devas forlasi nian defensivan pozicion kaj el la vortoj de dro Saheb-Zamani ĉerpi ekzemplojn por nia ofensiva agado.

Franko Luin

Du krimaj historioj

De Dansk Esperanto-Forlag venas la libroj *Venis viro kaj Ĉu vi kuiras ĉine?* Ili similas unu la alian estante ambaŭ krimromanoj en moderna medio, sed ankaŭ estas diferencoj.

La unua estas traduko de dana originalo verkita de Torben Nielsen, konata aŭtoro de krimromanoj kaj iama policano. Scenejo estas iu urbo en nuntempa Danlando. La heroo estas ekspolicano eksedziĝinta, sufiĉe malfeliĉa kaj soleca (almenaŭ ĝis la fino de la libro). Sola kaj per propraj metodoj li esploras la cirkonstancojn pri la morto de sia filo kaj fine sukcesas elfosi la veron. La esploro kondukas lin en rondojn de junaj mopeduloj kaj motorcikluloj, pli malpli gangsterecaj. La rakonto ŝajnas realisma, sed oni devas vere esperi, ke ĝi ne estas rekta respegulo de la vera hodiaŭa mondo.

Ĉu vi kuiras ĉine? fakte ne estas libro pri ĉina kuirarto, kiel sugestas la titolo, sed krimromano originale verkita en esperanto de Johán Valano, pseŭdonimo de deinfaneca esperantisto, kiu vivis kaj loĝis en pluraj landoj kaj mondopartoj.

La agado okazas en imagita lando nenie kaj ĉie, en la plaĉa landoparto Santavalo, kiu estas tiel vive priskribita, ke leginte la libron oni sentas sin hejme tie kaj eĉ sufiĉe multe scias pri ĝia speciala dialekto.

La ĉefpersono estas Jano Karal, simpatia policano ĝenerale kontenta pri sia laboro kaj sia ĉefo. Li vivas feliĉa kun sia edzino Ĝoja, profesia psikologino, kiu ofte helpas sian edzon pridiskuti la solvon de diversaj problemoj.

La romano sekvas la modelon de la klasikaj detektivromanoj, en kiuj unu persono mistike mortas en la komenco kaj la polico poste faras ĉiajn esplorojn kaj ĉirkaŭiras enketante la diversajn personojn, kiuj iel rilatis kun la mortinto; kaj fine en la lasta ĉapitro ili eltrovas la genian solvon, kiu klarigas ĉion kio ĝis tiam estis mistera.

Same en tiu ĉi libro la leganto akompanas la detektivon vizite al multaj diversaj personoj. Tamen la fina solvo estas iamaniere seniluziiga por la leganto, kiu penis mem ataki la misteron, ĉar li trovas, ke efektive mankas al li iuj informpecoj, tiel ke li apenaŭ havus teorion eblon memstare diveni la solvon. Ĉi-okaze oni tre ŝatus reviziti Santavalon kaj rerenkonti Janon

Ni legas kaj aŭskultas, laŭdas kaj mallaŭdas

kaj Ĝojan solvantaj pli da misteroj en pli da libroj!


La lingvaĵo de ambaŭ libroj estas viva kaj facila, kaj bone montras, ke en esperanto ne mankas esprimoj eĉ por la plej nuntempaj kaj laŭmodaj aferoj. Plue, sur la lasta paĝo, estas glosaro pri terminoj ne troveblaj en Plena Vortaro aŭ Plena Ilustrita Vortaro. La presado estas zorga.

Ambaŭ librojn oni povas rekomendi por kelkaj horoj da distrado kun samtempa ekzercado de moderna esperanta lingvo.

Nek

de juna viro, ĉirkaŭ kiu svarmas knabinoj. Ambaŭ partoj okazas en la tempo antaŭ kaj dum la dua mondmilito. La tagolibro mencias okazajojn de la milito. La tono de la unuopaj partoj tamen estas baze gaja, kaj nenio montras al la teruro de la tria parto.

La forta flanko de Rosbach estas la mallongaj rakontoj de la pli fruaj noveloj. Tiu ĉi romano ne bone sukcesis kiel romano: ĝi konsistas el kungluitaj rakontetoj, kiuj en si mem estas rakontaj, sed kiuj pli taŭgus sen la pretendoj de romano. Kelkfoje aperas filozofia temo de peko



Pli rakontoj ol romano

Johan Hammond Rosbach kutime verkas en malpeza, facila stilo, kaj plej ofte skribas novelojn. La rakontoj kutimas havi trankvilan tonon, kvazaŭ ĉiutaga rakontado.

Lia lasta libro, *Fianĉo de l'sorto*, estas romano, kaj kelkloke en ĝi oni retrovas la saman malpezan stilon.

Li rakontas pri du knaboj kun la sama nomo, kaj ŝajnas ke unu el ili estas simple li mem. La romano konsistas el tri partoj. La unua rakontas pri kelkaj ordinaraj aventuroj de knabo. La dua estas tagolibro

kaj puno, sed ĝi denove malaperas. La tragika fino ne kongruas kun la gajeta tono de la cetera libro.

Kelkfoje Rosbach uzas aron da malfacilaj vortoj, ekzemple en la unua paĝo de la libro. De tempo al tempo aperas norvegiismoj, kiujn la verkisto ne klarigas. En pluraj lokoj la frazoj estas kunmetitaj tiel, ke la enhavo fariĝas malklara. Tio ĉi donas iom amatorecan impreson pri la libro. La samon oni povas diri pri la teknika flanko de ĝi: la preso en si mem estas bona, sed la korektoj kaj paĝnumeroj estas videble amatorecaj.

La libro estas tamen leginda, speciale la unua parto, se oni ne fiksigas je la malfacilaj frazoj

sur la unua paĝo. Oni povas legi ĝin kiel kolekton de mallongaj noveloj, kiuj hazarde temas pri la samaj personoj.

Ulla Luin

Dulingva Frithjof-sagao

Tiu ĉi *Frithjof-sagao* estas duilingva libro: en ĝi estas presitaj paralele la sveda originalo kaj la esperanta traduko. La traduko evidente signifis gigantan laboron.

Ĝi esence sekvas la ritmon kaj rimon de la originalo, dum la aliteracioj ne estas sekvitaj. Abundas elizioj, eĉ kie oni povus facile eviti ilin. Nepermesataj elizioj kripligas la lingvon, ekzemple kvaz', amb'. Elizio ĉe la artikolo 'la' estas ofta, kvankam foje nenecesa. Pli bone estus elasi la artikolon, se tio ne falsigas la enhavon.

Multaj esperantistoj havas problemojn pri «ig» kaj «iĝ». Tial poetoj devus ne per «licentia poetica» eĉ pli konfuzi ilin (ne konfuzigi). Vortoj kiel brulita, hontita, pacita, palita, purita neniam estu vidataj! Same kombinoj kiel min gustas, karas min, mortkunas vin. Rimado per sufiksoj ne estas konsiderata bona stilo, sed jen svarmas ekzemple rimoj per -aj'.

Mi havas longan liston pri tiaj malgataĵoj, kiuj bremsas la fluron de la lingvo kaj faras ĝin malpli ĝuebla. Kelkajn liniojn mi ne povis kompreni se mi ne komparis kun la sveda teksto.

Oni ne povas postuli, ke traduko estu egalranga kun la originalo, sed ĝi tamen estas alir-ejo por nesvedoj al unu el la majstroverkoj de la sveda literaturo kaj tial bonvena.

La libro enhavas gramatikon de esperanto en la sveda lingvo. Bone kompilita, sed kiun oni celas? Por komencanto *Frithjof-sagao* ne taŭgas kiel studobjekto.

Salex

Nekonataj kaj konataj kantoj

Tra l'mondo estas neordinara disko en la esperanto-mondo: kaj teknike kaj muzike ĝi estas bona.

Oliver Tzaut kantas konatajn kaj nekonatajn kantojn el pluraj mondopartoj. Ili estas elektitaj kun bona gusto kaj la pecoj apartenas bone kune. Oni trovas tie ekzemple la judan kanton «Tumbalalajka», la usonan «Dek ses tunoj», ciganajn kaj

meksikajn kantojn ktp.

Tzaut havas bonan voĉon kaj bonan orelon por muziko. Nur kelkfoje oni rimarkas, ke iu tono je la fino de kanto estas tro longe tirita. Lia elparolo estas klara, kaj oni povas bone sekvi la tekstojn. Tion faciligas ankaŭ la presitaj tekstoj sur la kovrilo.

La muzika aranĝo estas plaĉa kaj varia. La teknika kvalito de la registrado estas sufiĉe bona, kaj la malmultaj mankoj ne ĝenas. Parolante pri la teknika flanko, oni povas ankaŭ mencii, ke la kovrilo estas bone farita.

La tekstoj estas tradukitaj de Claude Piron, kiu meritas apartan laŭdon. La lingva melodio bone sekvas la ritmon. La teksto estas flua, estas facile kompreni la enhavon, kaj li uzas ordinarajn vortojn. Ankaŭ la rimoj estas faritaj kun fantazio. Kelkfoje la traduko estas vere lerta, kiel en la amuza rekantaĵo de la kanto pri *Elimeleh*:

Kiam ambaŭ tamburistoj
tamburiste tamburadis,
tamburiste tamburadis ili du...


La prezo de la disko estas relative alta, sed por bona kvalito oni povas pagi iom.

Ulla Luin



—JARKONGRESO 1978—

Bonvenon al Uppsala la 22-23an de aprilo



Konata motivo el Uppsala kun studentoj antaŭ la universitato

Al plej multaj svedoj la nomo **Uppsala** donas imagon pri gaja studenta vivo («la urbo de eterna junaĝo») kaj vekas rememorojn el la lerneja instruado pri historio. Sendube ambaŭ tiuj sentoj estas iasence pravaj, sed la moderna Uppsala, kiu kun siaj preskaŭ 150 000 enloĝantoj okupas la kvaran lokon inter la svedaj komunumoj, estas ankaŭ grava centro por komerco kaj administrado. Industrioj ne abundas, kaj tio estas grava manko por atingi perfektan ekonomian kaj socian ekvilibron.

En la prahistorio de la sveda ŝtato Uppsala ludis tre gravan, eĉ ĉefan rolon. Jam en la antaŭkristana tempo la templo en

Gamla Uppsala (Malnova Uppsala) estis vaste konata pro sia riĉeco kaj kulto. En la jaro 1160 reĝo Erik Jedvardsson, poste pli konata kiel Sankta Eriko, estis murdita post partopreno en meso en la preĝejo de Sankta Triunuo. Ankoraŭ hodiaŭ ekzistas la puto de Sankta Triunuo, kie laŭ la legendo la reĝo perdis sian kapon. Eriko enteriĝis en la katedralo en Gamla Uppsala (kiu, cetero, jam en 1164 fariĝis ĉefepiskopejo) kaj baldaŭ li estis adorata kiel sanktulo. La korpaj restaĵoj de Sankta Eriko estis transportitaj al la katedralo en Uppsala post ĝia finkonstruo (en 1435), kie ili ankoraŭ ripozas en orumita ŝran-

ko.

La katedralon kaj aliajn ekleziajn konstruaĵojn oni konstruis ĉe la okcidenta flanko de la rivero *Fyriså*, oriente etendiĝis la komercaj kvartaloj. Kvankam Uppsala suferis pro fajro en 1702, la ideo de tiu mezepoka urboplano esence restis ĝis hodiaŭ: preskaŭ ĉiuj universitataj konstruaĵoj, ĉiuj studentaj kluboj («nacioj») escepte de unu, kaj la plej gravaj ekleziaj konstruaĵoj situas en la okcidenta urboparto, oriente troviĝas magazenoj, butikoj, industrioj kaj modernaj loĝkvartaloj.

En la jaro 1477 ĉefepiskopo Jakob Ulfsson fondis la unuan universitaton en Skandinavio. Pasintjare oni fiere, kaj gaje!, festis la kvincentjaran jubileon de la universitato. En la 18-a jarcento Uppsala fariĝis la centro de sveda scienca vivo, kaj ĉirkaŭ Carl von Linné kolektiĝis studentoj el la tuta mondo. Ankaŭ hodiaŭ multaj studentoj venadas al Uppsala; ĉirkaŭ 20 mil studentoj nun studas en la universitato.

La Esperanto-Societo de Uppsala havas dignan historion kiel unu el la plej malnovaj ankoraŭ vivantaj esperanto-kluboj. Redaktora kolektivo (Langlet, Nylén, Ahlberg, Krikortz) de decembro 1895 ĝis 1899 prizorgis la tiaman ĉeforganon de la esperanto-movado, *Lingvo Internacia*, en Uppsala.

La jarkongreso de SEF ĉijare daŭros nur du tagojn dum «ordinara» semajnfino, kaj tio donos al partoprenonto nur mallongajn momentojn por spekti la historiajn kaj modernajn facetojn de Uppsala, sed plilongigi la restadon unu aŭ du tagojn certe valoros.

Bonvenon!

Tomas Jansson

Ni recenzis:

Venis viro. T. Nielsen. Dansk Esperanto-Forlag 1976. 76 p. Prezo: 18,70.

Ĉu vi kuiras ĉine? J. Valano. Dansk Esperanto-Forlag 1976. 136 p. Prezo: 30,15.

Fianĉo de l'sorto. JH Rosbach. Dansk Esperanto-Forlag 1977. 192 p. Prezo: 52,50.

Frithjof-sagao. E Tegnér, tradukis Wilhelm Theodor Oesté. Eldonejo Gabrielli. Prezo: 115,—.

Tra l'mondo. Kantas Oliver Tzaut. 33 cm disko. Prezo: 88 kronoj.

Ĉiuj libroj aĉeteblaj ĉe Eldona Societo Esperanto.

NYÅRSERBJUDANDE från Esperantoförlaget



Vi behöver plats på våra hyllor och säljer därför ut en mängd äldre — ofta mycket intressant — litteratur.

Vi sänder förteckning med prislista på begäran.

Böckerna finns mestadels bara i enstaka exemplar. Den som kommer först har chansen!

Förlagsföreningen
Esperanto
Fack, 200 42 Malmö

«La lando de la rozoj» gastigos esperantistojn



La kongresurbo Varna estas moderna urbo proksime al la maro

La epiteto «la lando de la rozoj» estas epiteto, kiun bulgario neniam evitas mencii. Ĉie oni trovas la rozojn, abunde floran-taj en majo kaj junio. Al la Roz-valo turistoj venas por admir-adi. Tie la kulturado kreskis al industrio, kies produkto ĉefe estas rozoleo.

La bulgara flaŭro estas varia. Dank'al bona klimato troviĝas tie mezeŭropaj, mediteraneaj kaj stepaj florspecioj.

La bona klimato ankaŭ ebligas grandajn rikoltojn de diversaj fruktoj kaj legomoj, kiujn oni grandkvante eksportas, interalie al Svedio. Dum pluraj jaroj oni disvastigis la kulturatan areon per irigacio; alkonduko de akvo per tuboj al antaŭe seka grundo.

La bulgara vino estas konata ĉe ni kaj turistoj vizitintaj *Slan-čev Brjag* (Sunstrando) kaj *Zlatni Pjasaci* (Oraj Sabloj) scias rakonti pri pruna brando.

La bulgara industrio ankaŭ kreskis kaj ni trovas i a bulgarajn motorojn, bateriojn kaj vestaĵojn en nia lando. Bulgario batalas por fariĝi nacio kun granda industrio. En la kuranta kvinjara plano oni atentis la laborkondiĉojn kaj la industrimedion. Rilate laborkondiĉojn ni citas T. Jivkov, kiu en Raporto de la Centra Komitato diris, ke oni devas «...realigi specialajn aranĝojn por plimultigo de la produktado de teknikaj ri-

medoj por batalo kontraŭ la bruoj, por malpliigo de la vibra-doj, konservo de la aerpureco, bonigo de la lumigado, likvido aŭ sendanĝerigo de la malutilaj defalajoj k a. Apartan aten-ton oni devas turni al la labor-kondiĉoj de la virino konsidere al la protektado de ŝiaj funkcioj de patrino kaj al la nasko de sana generacio.»

Oni ankaŭ estas konscia pri la natura medio: «Post la Deka Kongreso estis aplikitaj seriozaj rimedoj por protekto de la natura medio. Malgraŭ tio oni ne utiligis plene la avantaĝon de la socialisma sistemo en tiu ĉi sfero. La evoluo de la ekonomio rezultigos funkciadon de novaj malpurigaj produktadoj. Sekve, en la laboro por protekto de la natura medio oni devas fari radikalan turnon por likvidi la damaĝojn kaj ne permesi novajn leĝorompojn, apliki kompleksan metodon por certigi, laŭ la vortoj de Marks, harmoniajn rilatojn inter socio kaj naturo. Tiusence oni devas altigi la rajtojn kaj la respondecojn de la respektivaj ŝtataj kaj publikaj faktoroj.»

La loĝproblemo, precipe en la grandaj urboj kaj industririg-ionoj, ankoraŭ ne estas solvi-ta. En 1976 la loĝeja surfaco estis 13-14 kvadratmetroj po persono.

Bulgario ekde 1946 estas po-pola respubliko. Ĉiun kvaran

jaron oni elektas membrojn al la parlamento *Narodno Sabra-nie*. Troviĝas du politikaj parti-oj: la komunista kaj la agrara.

HISTORIE RIĈA LANDO

Oni trovis en Bulgario ĝis 100 mil jarojn aĝajn kulturajn tavolojn. Ĉi tie naskiĝis la traca kul-turo, kiu kun la slava kaj pra-bulgara kulturoj estas la fonto de la nuntempa kulturo. Ĉi tie la du fratoj Cirilo kaj Metodo inventis la cirilan alfabeton antaŭ pli ol 1100 jaroj.

Bulgario fondiĝis antaŭ ĉir-kaŭ 1300 jaroj kiel reĝlando. Ĝi dum 500 jaroj apartenis al la turka regno kaj estis liberig-ita de ĝi antaŭ nur 100 jaroj. Kulture multaj malnovtempaj trajtoj ankoraŭ restas, precipe en la kamparo.

La malnovtempa metia arto ankoraŭ vivas kaj aperas en nuntempaj memoraĵoj kiel led-kaj peltvaroj, ceramiko, ligno-skulpto, ferforĝado ktp.

Troviĝas pli ol 500 fontoj kun mineralakvo en la lando kaj fon-diĝis amasoj da kuraĉlokoj de romanaj kaj bizancaj imperies-troj. Konataj fontoj troviĝas, ekzemple, en Drujba kaj Zlatni Pjasaci, en la proksimeco de Varna.

Bulgario, kun grandeco de kvarono de Svedio, havas prok-simime la samnombran loĝant-aron. Montaro kovras du trio-nojn de la lando. La plej alta monto, kiu situas en la suda parto de la lando, mezuras 2925 metrojn super la maro.

La nigramara bordo konsis-tas el sablostrandoj unu post la alia laŭlonge de 368 kilometroj. La sablostrandoj estas ŝatataj de la turistoj, por kiuj oni kon-struis multajn novajn hotel-

VÄRLDSKONGRESSEN VARNA 1978

Avgifter till 31 mars 1978:

1. Icke medlem i UEA	340 skr
2. Medlem med årsbok	300 skr
3. Medlem med årsbok och tidn. «esperanto»	240 skr
4. Make/maka till (1)	245 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	210 skr
6. Ungdom t o m 20 år	105 skr
7. Universitetsstuderande t o m 30 år	175 skr
8. Synskadad	140 skr

Upplýsingar och blanketter hos s-ino Ester Andrén, Rege-mentsgatan 27d, 217 53 Malmö (tel. 040-6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoför-bundet, Specialkonto, Malmö.

arojn dum la lastaj dek jaroj.

La meza temperaturo en aŭ-gusto estas 24,5 gradoj en la akvo kaj 23,6 gradoj en la aero. Laŭ statistiko la suno brilas 31 tagojn en aŭgusto kaj pli ol 12 horojn tage.

La saleco de la Nigra maro estas nur duono de tiu de la Me-diteraneo.

LA KONGRESURBO VARNA

Varna, la kongresurbo, situas ĉe la marbordo. Pli ol 500 ja-rojn a.K. la grekoj konstruis la kolonion Odessos en tiu loko. Odessos evoluigis al floranta urbo dum la romia periodo.

Varna hodiaŭ estas regiona, komerca kaj industria centro, la plej granda haveno kaj la so-mera ĉefurbo de Bulgario rilate al turismo. Se vi dum via resta-do intencas ĝui la marbordon, eblas loĝi en Drujba, 10 km nor-de de Varna, aŭ en Zlatni Pja-saci, 17 km norde de Varna.

Anita Lindblom



Kaj jen Oraj sabloj, la turista banloko en la proksimeco de Varna

Pli da virinoj en la gvidaj postenoj!



Kelkaj partoprenantinoj en la virina konferenco ...

Kiamaniere plialtigi la reputacion de la virino en la esperantomovado? fariĝis unu el la ĉefaj demandoj, kiujn diskutis deko da virinoj dum semajnfina konferenco pri virina agado, fine de novembro 1977 en Gotenburgo. La ĉefpreleganto estis s-ino Elsbeth Bormann, prezidantino de Germana Esperanto-Asocio kaj gvidantino de la Komisiono pri Virina Agado de UEA.

Pluraj el la partoprenantoj povis konatiĝi kun Elsbeth Bormann jam kelkajn tagojn antaŭe. Je invito de la Gotenburgera Esperanto-Alianco ŝi gatis en la ordinara kunveno la 23an de novembro. Prezertante la agadprogramon de GEA ŝi ankaŭ tuŝis la fakton, ke virinoj malofte aperas en gravaj postenoj de nia movado. Tiu ĉi pro-

blemo fariĝis poste la centra diskuttemo de la konferenco.

S-ino Bormann enkondukis per detala prezento de la celoj kaj laboro de la Komisiono pri Virina Agado. La komisiono estis starigita en 1975, la Internacia Virina Jaro, por gvidi la partoprenon de UEA en la laboroj de tiu evento. La komisiono kunvenas ĉiujare dum la Universala Kongreso; la cetera kontakto inter la membroj okazas ĉefe skribe. La agado de la komisiono iniciatis plurajn aranĝojn sur loka bazo okaze de la Internacia Virina Jaro. Tiu aktivado turnis sin ofte al ekstera publiko. La esperantistaj kluboj kaj organizaĵoj povis tiam pli vaste informi pri sia laboro por emancipiĝo de la virino. La partoprenantoj de la konferenco

estis ankaŭ memorigitaj pri ĉiuj aktivecoj dum UK en Kopenhago, kie la virina situacio en la hodiaŭa socio estis ĉiutage diskutata en preletoj kaj kunvenoj.

La laboro de la komisiono montriĝis tre sukcesa dum la unua jaro de sia ekzistado. Pro tio la estraro kaj la komitato de UEA decidis fari tiun komisionon konstanta.

La laborplano por la venonta agadperiodo de la komisiono estas: aranĝi apartajn programerojn por virinoj dum estontaj UK, vaste distribui la jam pretan raporton pri la ĝisnuna agado, pli atentigi pri la rolo de la virino en la laboro por disvastigi esperanton, aktive alpaŝi neesperantistajn virinajn organizaĵojn por atentigi ilin pri la avantaĝoj de esperanto kiel internacia komunikilo inter virinoj.

Al la ĉefa punkto de la laborplano apartenas la tasko kunvoki specialan virinan esperanto-konferencon en iu el la plej proksimaj jaroj.

Post tiu ĉi enkondukita preleto disvolviĝis vigla diskuto inter la partoprenantoj. La ĉeestantaj virinoj (kie estis la viroj?) interŝanĝis siajn spertojn pri la seksa diskriminacio en la laborejoj, lernejoj kaj en la rilatoj inter viroj kaj virinoj ĝenerale.

Binca Hornö komparis la pozicion de la virino en socialisma socio (Jugoslavio) kun tiu de virino en Svedio. La diskuto kondukis ankaŭ al komparo inter la situacio de la virino en industrie evoluinta socio kaj en la tria mondo. Diversaj historiaj premisoj en diversaj landoj kaj ilia rolo por la hodiaŭa vivo de la virino estis pritraktataj.

La partoprenantoj esprimis la bezonon pri speciala internacia virina esperanto-konferenco. Aparta virina organizaĵo sur pli



... kaj Märtha, kiu organizis ĝin

larĝa bazo estis ankaŭ unu el la deziroj de la ĉeestantaj virinoj. La mondskala laboro pere de esperanto por liberiĝo de la virino estas ne nur bona, sed ankaŭ necesa ideo inda je realigo.

La virina konferenco en Gotenburgo finiĝis en inspira etoso kaj fortaj sentoj de komuneco. Multaj realigendaj ideoj, kiuj vekigis dum la diskutado, estas nun taskoj plenumotaj. Dependas de ni mem, kiel ni sukcesos.

Iva Åberg

HELSINGØR 1978

La internaciaj feriaj esperanto-kursoj, la 46-aj sinsekve, okazos la 23-an ĝis 29-an de julio en la Internacia Altlernejo de Helsingør, Danlando. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kapitu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe s-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør

Konstrui per

YTONG[®]

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

«För oss är esperanto en livsnödvändighet»

Ett nytt land har med stora kliv trätt in på esperantoarenan: Iran. Sedan två år tillbaka håller esperanto att erövra studenterna vid universitetet i Teheran. Och allt detta tack vare en enda man!

Mannen heter dr M. H. Saheb-Zamani, professor i islams sociologi vid universitetet och f d generaldirektör för mentalhälsovård vid hälsovårdsdepartementet i Iran.

Förutom studenter kommer på hans kurser även många personer med hög offentlig position i det iranska livet: en direktör från utbildningsdepartementet, en annan från energidepartementet, pensionerade officerare osv. 2 500 har redan gått igenom hans kurser, en ny lärobok som han utarbetat har kommit ut i tre upplagor på två år, i sammanlagt 14 000 exemplar. Intresset för esperanto finns alltså även utanför Teheran. I en intervju med Victor Sadler, direktör vid UEA i Rotterdam, och publicerad i tidskriften *esperanto*, december 77 och januari 78, har han berättat, att universitetet har fått avdela två tjänstemän för att besvara alla förfrågningar om esperanto.

Dr Saheb-Zamani, som nu är 46 år, kom i kontakt med esperanto för 30 år sedan, men först för ca tre år sedan blomnade hans intresse upp på nytt. Han började då att berätta till sina studenter om språkproblemet och om språket esperanto. Sin första kurs höll han inom familjen, sin andra till ett 15-tal elever, först hemma hos någon och senare, när antalet blev för stort, i en skola i Teheran.

Han började samtidigt bearbeta olika journalister, så att allt fler tidningar började publicera nyheter om esperanto.

Efter ytterligare ett föredrag på universitetet fick han flytta kursen dit. Universitetet började också samla artiklar om esperanto på persiska och skicka ut dem i tusentals exemplar. Han fick en lärobok utgiven, en liten ordbok och snart kommer en samling av hans artiklar om esperanto ut.

Eftersom religionen spelar en stor roll i Iran, tog han kontakt med religiösa ledare för att förklara för dem att esperanto inte hade några politiska eller religiösa band. Han hade stor hjälp



Det andra språket heter dr Saheb-Zamanis esperantolärobok i detta av *Koranen* som finns i en esperanto-översättning.

Genom ett islamiskt läroinstitut håller kunskapen om esperanto att spridas, fortfarande mycket långsamt, även till andra islamitiska länder.

Ett annat område, som dr Saheb-Zamani inte försummat är diplomater: sedan en tid har han en orienteringskurs om esperanto för diplomater som kommer hem för att aktualisera sina allmänna kunskaper.

Dr Saheb-Zamani kan förstås inte klara allt detta ensam. I Teheran finns det nu 12 st som håller kurser i esperanto. Och det är fråga om verkligt stora kurser, med 100-150 deltagare i varje. Var tredje vecka startar en ny kurs och man kan lätt hoppa från den ena till den andra, t ex om man är tvungen att avbryta för några veckor.

Det här är en sida av dr Saheb-Zamanis verksamhet. Det finns en annan, djupare sida som förklarar varför han har satsat så hårt på esperanto. Låt oss titta på vad han säger själv om orsaken till sitt engagemang:

«Vi måste välja ett lämpligt kommunikationsmedel för varje kommunikation. Dom allmänna profeterna — både idealistiska och materialistiska — har aldrig tänkt på vilket kommunikationsmedel man ska välja för sitt meddelande. Marx, t ex, har skrivit att alla förtryckta måste enas. Men på vilket språk ska dom enas? Ska det vara på pashtu, farsi, gujarati eller tyska? Ska dom lära sig tyska eller vänta på översättning till deras språk, och vem ska översätta? Ska aristokraterna göra det, som kun-

de resa till Europa och lära sig europeiska språk, översätta för folkmassorna, så att dom kan ena sig och göra uppror mot aristokraterna?

Människans kulturarv har i första hand samlats i väst, och det saknas ett kommunikationsmedel för att få det till andra delar av världen. Vi har inte obalans bara i ekonomin och hälsovården, utan också i kunskap, och kunskap kan man inte transportera till tredje världen. Bara när vi kan lyfta kunskapsnivån i tredje världen kan dess befolkning hjälpa sig själv. Och bara då ska andra folk kunna hjälpa dom effektivt.

Den första hjälpen som vi kan och måste ge dom är ett kommunikationsmedel, som telefon, med vilket dom lättare kan tillgodogöra sig västerlandets kunskap, det kulturella arvet, vetenskap och teknik, och med hjälp av det nå kulturell likställdhet och balans. Utan ett sånt kommunikationsmedel blir diskrimineringen på det kulturella området kvar, och som en följd av det även på det ekonomiska och kanske även på rasområdet. Allt detta för att den tredje världen har en handikapp när det gäller språk och inte kan följa den internationella utvecklingen i kultur och teknik. Som psykolog vet jag, att intelligens inte är något specifikt för västerlandets eller östländernas (i politisk bemärkelse) folk. Även folk och ungdomar i tredje världen är mycket intelligenta. Fördelningen av intelligens är överallt lika. Skulle det inte finnas ett språkligt handikapp, skulle dom inte bli efter.

När jag tänker efter alla problem som ungdomen i tredje världen har, så märker jag, att alla pratar tyligt om ungdomens olika problem. Medan den hu-

vudsakliga problemet är, att det i väst idag finns så mycket vetenskap, kunskap och teknik, som skulle kunna användas av ungdomar i tredje världen, men som inte kan nås av dem just på grund av språkbarriärer och diskriminering. Jag ser framför mig en grundlig revolution för hela den tredje världen. Allt detta kan nås med hjälp av ett lättlärt språk. 347 år av brittisk kolonialmakt i Indien och på andra håll har visat, att västerlandets s k naturspråk inte duger till det som vi behöver. Vad vi behöver är, för mig, esperanto.»

Så långt dr Saheb-Zamani i denna fritt översatta del av intervjun. I fortsättningen kommer fram hans syn på oss västerlandets esperantister: vi behöver egentligen inte ha esperanto. För oss är det en lyx. För människorna i tredje världen är det däremot fråga om att överleva kulturellt eller dö. Som Victor Sadler sammanfattade intervjun i sin kommentar, det är inte europeiska anekdoter från förra seklet som behövs, inte heller sentimentala berättelser om förälskelser på kongresser, utan moderna texter som behandlar aktuella kulturella, vetenskapliga, ekonomiska problem, skrivna på ett begripligt språk.

Aktiviteten i Iran har satt ett stort frågetecken på hela vår esperantoverksamhet (där vår är lika med västerlandets esperantisters). Om du har tidskriften *esperanto*, läs hela intervjun (i december 77- och januari 78-numren), om du inte har det, försök låna det från någon på klubben.

Och varför inte: ordna en diskussionskväll, där ni tar upp de frågor och exempel på aktiv verksamhet!

Franko Luin

EL POPOLA ĈINIO

Moderna lukse ilustrita
informa revuo pri la
moderna Ĉinio

Abonprezoj

1 jaro	14 skr
2 jaroj	21 skr
3 jaroj	28 skr

pagu al

Eldona Societo Esperanto
Fack, 200 42 Malmö, pg 578-5